# Aŭstraliaj Esperantistoj


## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 03/06/2021 Kvincenttridektria eldono (unua eldono 20/09/2011)**




## Subtenu vian Novaĵleteron


Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer
rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Entute 808,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo




Nun studas 279,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas 231,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas 207,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas 91,000 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde septo 2021)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).




N.ro 37 de "Por Komencantoj".

GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:



1). Kio estas la gramatika subjekto de la ĉefpropozicio (=ĉeffrazo) en "Ke li manĝis la tutan torton, ne estas bona".

2). Eĉ la verbo povas havi difinan subfrazon, kiel en "Li manĝis, TIO ESTAS LI MANĜAĈIS, la tutan torton". En tia subfrazo, kio estas la gramatika subjekto?

3). Krom enhavi la devigan verbon, la predikato povas enhavi infinitivon, ĉe la modaj helpverboj, kaj ĝi povas enhavi ion alian, kun verboj kiaj "esti". Kion oni nomas tian parton de la predikato, ekzemple en "Li ĉiam estis fidela amiko"?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 533.

*Marcel Leereveld.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)




## _La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



http://esperantaretradio.blogspot.com. 28a Majo 2021

Bebokestoj, kie eblas demeti nedeziratajn novnaskitojn **Babybox**

# Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.



## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater Cafe 28-29 Suda Stejno. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj. La 5a de junio estos la unua sabato. Venu!! *Roger Springer*

## Gaso





Estas bilionoj da tunoj da reakirebla gaso kuŝanta sub la disputataj akvoj ĉe Gazao, Israelo, Sirio kaj Libano. Ĉu estas alia kialo por la Israela-Palestina konflikto? Mono regas la mondon.

## Mortigu protestojn



Vi ne mortigas protestan movadon per forto kaj opozicio. *Roger Springer*
Vi mortigas ilin per mensogaj vortoj de reformoj, (sed neniam agu!) kaj atendado.

## Siria prezidento Assad reelektiĝis kun 95% da voĉdonoj je majo 2021.



Siria popolo sopiras pacon. Do la voĉdona rezulto.
Ĉu Australio mortigas homojn en Sirio por subteni la popolon? Jan 2021 Australia bombs targets in Syria
Australians for War Powers Reform *Roger Springer*

Esti malamiko de Usono estas danĝere sed esti aliancano de Usono estas mortiga Henry Kissinger

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917

## Gramatiko por ĉiuj.

### LA SIGNIFOJ DE LA ESPERANTAJ PARTICIPOJ .

1. ADJEKTIVOJ (la baza radiko de tiaj sufiksoj) .

AKTIVA: (Infano pomon ) manĝANTA
= being partway of the action of eating.
= estas partvoje dum la ago de manĝi.

(infano pomon) manĝINTA
= having finished somewhere in the past the action of eating.
= finis iam en la pasinteco la agon de manĝi.

(infano pomon) manĝONTA
= sometime in the future doing and finishing the eating.
= iam en la estonteco faros kaj finos la agon manĝi.

PASIVA: (La pomo estas) manĝATA
= in the process of still being eaten.
= ĝi plu ricevas la manĝadon.

(La pomo estas ) manĝITA
= underwent being fully eaten somewhere in the past.
= la pomo iam komplete subiris la agon manĝi.

(La pomo estas) manĝOTA
= somewhen going to be completely eaten.
= ĝi subiros manĝadon komplete iam en la estonteco.

La formoj kun "-anta" kaj kun "-ata" indikas "daŭran" verbtempon.
La tempoj de la agoj de la formoj kun "-inta" kaj "-ita" kaj kun "-onta" kaj "-ota" ne necese iras ĝis la nuno nek tuj el de la nuno.
La tempo de la sufiksoj "-inta" kaj "-ita" nomiĝas "preterito".
La tempo de la sufiksoj "-onta" kaj "-ota" nomiĝas "futuro".
Propra participa "prezenco" ne ekzistas en Esperanto.

2). ADVERBOJ. Ili kondutas kiel la adjektivoj.

3). SUBSTANTIVOJ. Ili indikas nur homojn.

4). VERBOJ. Ekzistas nur unu, por la PASIVO: "-ati",
= La unuvorta "pasiva voĉo" kun normalaj verbfinaĵoj.

Marcel Leereveld.

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# **Universala Pensio** povus:



Doni sekuron al via vivo.
Forigi la ideon ke oni devas labori aŭ morti.
Liberigi inojn de maldecaj postuloj por resti en iu laboro.
Forigi la neceson vendi la korpon, ktp por la vivmono.
Liberigi la ekonomiajn sklavojn.
Neniuj devos timi malcertan estontecon.
Trankviligi la popolon.
Malpli da homoj mensmalsanas
La maŝinoj kaj komputeroj nuligas la neceson ke ĉiuj devas labori.
Doni la eblecon al ĉiuj havi parton de la riĉaĵo tiel produktita.
Lasi la laboron por tiuj kiuj deziras labori kaj havi pli da mono.
Permesi riskajn projektojn ĉar se oni fuŝos oni ne mortmalsatos
Nunaj pensiuloj ne rajtas labori sen perdo de parto aŭ de la tuto de la pensio.





**Senhavaj homoj ŝtelos, oni ne malsatmortas en paco.**

**Kion vi opinias?.** *Roger Springer*



**La UBE ne sigifas ke oni ne povas labori por havi pli da mono kaj pli bonajn vivkondiĉojn.**

Du artikoloj pri viv/mortaj temoj por Aŭstralianoj (Angla lingva)
1/kosto de domoj estas problemo.
2/historio de nia malamikeco kun Ĉinujo
CITIZENS REPORT 21 May 2021 - House market sucking Australia dry / Pushback against China narrative - YouTube (enudgemail.com.au)



**3ZZZ** Se vi deziras scii kiu estas Sebastao Salgado aŭskultu la elsendon de la 31a de majo 2021. Plie pro tio ke tiu semajno estas la semajno de reamikiĝo kun la aborigena polpolo, vi trovos ankaŭ informojn pri la problemoj kiujn alfrontas indiĝenaj popoloj, kaj novajn kantojn de Kajto kaj de Barok-projekto ....*Franciska Toubale*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)* **SOLVO DE LA KVIZETO 36**



1). La tuta subfrazo "Ke li manĝis la tutan torton" estas la subjekto de la ĉeffrazo.
2). "TIO".
3). La predikativo. *Marcel Leereveld.*

## **Pli pri reago al la artikolo de Ken Rolls.** En sia reago (AE531) al mia artikolo (AE530) pri la patentanto de la kontraŭ kronvirusa vakcino, Franciska Toubale faris la demandon: "Ĉu ĝustas ke la farmaciaj kompanioj realigu grandan profiton … ?"



Ĉu ili gajnis **grandan** profiton? Ĉu vere? Mi ne konsentas pri granda profito, sed mi komprenas ke iu ajn kompanio devas fari profiton por daŭri en komerco. "Profito estas la kosto de daŭro!" *Ken Rolls*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***